

La Espero

2005:5

61a Internacia Junulara Kongreso 61:a Internationella Ungdomskongressen



Fotis: Johan Krig Ölund



kaj somera kurso en Lesjöfors

Studgrupo el Ludvika komencis lerni la internacian lingvon en septembro 2004. Sep el la okpersona rondo decidis partopreni la ĉi-jaran kurson en EsperantoDomo en Lesjöfors.

De maldekstre: Jim Floxe, Anna-Maria Lange (instruistino), Lena Egilsson, Ove Egilsson, Thomas Tulkiewicz, Karin Tulkiewicz kaj Barbro Lovang. (Jorge Nunez mankas en la bildo.)

En la sudpola urbo Zakopane ke la piedo de la montaro Tatroj, kolektiĝis en la unua Aŭgusta semajno 500 junaj esperantistoj el multaj landoj por renkontiĝi, amuziĝi kaj paroli Esperanton - la internacian lingvon.

I den sydpolska staden Zakopane vid foten av Tatraberger samlades den första veckan i augusti 500 unga esperantister från många länder för att mötas, ha roligt och tala esperanto - det internationella språket.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Oktober 2005 • 93-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2005: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2005:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande:

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@globalnet.net

När kommer *La Espero* 2005?

Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 6 31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. Icke beställda manus återsänds ej.

NI PREZENTAS

Magnus Henoch

Nova prezidanto de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo

Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Gotenburgo, la 2-an de Septembro 1984.

Kie vi loĝas?

Gotenburgon mi neniam forlasis; mi restis tie ĝis nun.

Pri kio vi laboras?

Mi studas komputilan teknikon en la teknika universitato de Chalmers.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanton?

Diveneble komputilojn, kaj ankaŭ muzikon. Mi iom mallerte ludas bekluton kaj hobojojn. Ankaŭ pri lingvoj mi interesiĝas, sed tio pli kaj pli cedas tempon al aliaĵoj.

Ĉu vi havas familion?


Jes, mi ankoraŭ loĝas kun miaj gepatroj kaj gefratoj.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Mi komencis lerni la lingvon en la printempo de 1998, komence nur rete. Post jaro mi komencis ekkoni la movadon en "la vera vivo", kaj trovis ke estas tre plaĉe paroli la lingvon.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Jam de kelkaj jaroj mi prizorgas la retpaĝojn de SEJU (lastatempe kun



helpo de Carl Mäsak). Ĉi-printempo mi elektiĝis SEJU-prezidanto. Krom mi estas estrarano de la Esperanto societo de Gotenburgo.

Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?

Bedaŭrinde ne. Mi estas junulo sufiĉe ordinara, laŭ esperanta mezuro. Foje mi pensis, ke mi estas la plej juna esperantisto en Svedio, sed feliĉe tio ne estas vera.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

Estimataj samideanoj!

Tiun ĉi fojon mi havas pli da loko ol ordinare por la redaktoraĵoj, sed mi havas malpli multe ol ordinare por diri. En preskaŭ ĉiu numero de *La Espero* ni publikigas nekrologojn pri forpasintaj samideanoj. Kelkaj el ili estis konataj nur al malmultaj esperantistoj, ĉar kelkaj estis ne tre aktivaj en la Esperanto-movado, sed tamen gravaj por la movado, ĉar ili uzis la lingvon ekster la movado mem. Aliaj estis tre aktivaj en la movado mem.

En tiu ĉi numero de *La Espero* mi publikigas nekrologon pri Franko Luin. Ĝi estas pli granda ol ordinara nekrologo en *La Espero*, ĉar ĝuste por la revuo *La Espero*, same kiel por Sveda Esperanto-Federacio kaj por Eldona Societo Esperanto Franko estis tre grava homo.

Kiam mi antaŭ preskaŭ 30 jaroj fariĝis redaktoro de la tiama revuo de SEJU "ktp" mi heredis la taskon de Franko. Franko ankaŭ kreis la grafikan aspekton de *La Espero*, kiun mi nun redaktas. Tio signifas ke la aspekto de la rubrikoj, de la paĝoj kaj ankaŭ de multaj literoj en la revuo estas desegnitaj de Franko mem.

Franko forpasis. Pri tio vi povos legi sur paĝo 7. Lia verko tamen restas. Ĉiu litero kun mi enskribas en la komputilo memorigas min pri tio. Hodiaŭ mi havas multon por diri pri Franko Luin. Cetere mi havas malmulton por diri. Li mankas al mi. Ekde nun mi estas senhelpa pri la teknikajojn de la revuo *La Espero*.

Via redaktoro

58 partoprenis sukcesan seminarion en Esperanto-Domo

Multflanka kunlaboro Finnlando – Svedio

La tradiciaj seminario de Sveda Esperanto-Instituto (SEI) kaj Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) kunfandiĝis 16 - 18 sep 2005 en EsperantoGården (Esperanto-Domo), Lesjöfors, Svedio. Malgraŭ nefavora decido de la Kultura fonduso Finnlando-Svedio al nia petskribo la evento realiĝis multflanka.

La busveturo tra la malnovaj fertraktintaj regionoj kun tradiciaj ruĝkoloraj domoj inaŭguris la temon literaturo kaj muziko. Anita Dagsmarsdotter rakontis kaj muziko ludis. En Avesta ni kafopaŭzis en la Jularbo-muzeo, nomita laŭ la legenda tirharmonikisto. Tiun instrumenton dum la semajnfino multfoje traktis Lauri Liukkonen kun Tiina Oittinen violone kaj Anja Karkiainen kante. La finna triopo kun Martin Strid brile sukcesis kantigi la 58-personan publikon (27 el Finnlando, 2 el Norvegio kaj 29 el Svedio). La melodiojn Martin prezentis krom violone ankaŭ tonsilabe. Temas pri sistemo, kiu indikas melodion sen muziknotoj.

La sabatmatena literatura kvizpromeno preparita de Sten Johansson kaj Carola Antskog postulis, same kiel pluraj aliaj programeroj, kunaga-

don trans la kulturaj limoj. Karkianen prezentis siajn proprajn E-rimaĵojn kaj rakontis pri Aleksis Kivi, la frua finnlingva verkisto, kies verko *Sep frat*oj lasis multajn spurojn en la finna socio. Interese estis lerni pri lia vivo mizera, kiun sekvis rekono nur post la morto. Kerstin Rohdin rakontis pri Astrid Lindgren, la multflanka persono kaj verkistino, kiu per Pipi Ŝtrumpolonga enkondukis infanedukan revolucion. Ekskurso al Mårbacka, muzea bieno je 100 km-a distanco de Lesjöfors, konatigis la vivon de la verkistino Selma Lagerlöf. Kiel farmistino ŝi donis laboron al multaj senlaboruloj, ŝi vere bezonis la nobelpremian monon. Remburita ansero rememorigas pri Akka en "La Mirinda Vojaĝo de Nils Holgersson". Lagerlöf donis la rajton al Esperanto traduki ĉiujn siajn verkojn.

Realigis kunvenoj de Eldona socio Esperanto, koopera socio Esperanto-Gården kaj SEI. Spertojn dum nokta babilado interŝanĝis la estraroj de EAF kaj Sveda Esperanto-Federacio (SEF). Kun granda malĝojo ni ekaŭdis ke Franko Luin, ĝis majo prezidanto de SEF (Sveda Esperanto-Federacio), post mallonga malsano forpasis. Bengt-Olof Åradsson, la nova prezidanto de SEF, faris funebran parolon. Ni kune kantis svedan himnon.

La "pensisto" Bertil Nilsson faris

kavalkadon de diversaj trajtoj en la historio de Esperanto. Odd Tangerud, prezentita de Lars Forsman kiel "la leono de Norvegio" deklamis poemojn ĝislarne tuŝajn kaj per unupersona realigo *La svato*, triprotagonista dramo de Ĉehov, provizis dignan finon al la seminario.

La bona etoso daŭris surbuse. En Stokholmo ni diris "ĝis la revido" kaj la finnoj plu ŝipis al Turkuo, la urbo de la sekvaj Vintraj Tagoj 25-26 Marto 2006.

Siv Burell kaj Anna Ritamäki

Pri Esperantogården

Dum la seminario okazis ankaŭ jar-kunvenoj de Eldona kaj tiu de Esperantogården.

Montriĝis ke Esperantogården dum la periodo julio 2004 ĝis Junio 2005 havis ne grandan malprofiton. La enspezoj de Esperantogården plej multe devenas de gastoj kiuj venas en februaro por rigardi Svenska Rally, de la Someraj kursoj kaj de eventualaj aranĝoj de esperantistaj organizaĵoj. Rally postulas multe da laboro kaj sekve ankaŭ helpo de ekstere kaj en la pasinta jaro ĉi tiu helpo estia eksterordinare bona kaj abunda, multe dank al Wim kaj liaj kolegoj, sed ankaŭ grupo el Skövde kiuj faris antaŭpreparojn kaj Anita kaj Soile kiuj lavis grandan parton de littolaj poste. Pri Kalle oni nenion bezonas diri, li estas ĉiam kaj ĉie - kion ni farus sen li?

La organizado de la Someraj kursoj ankoraŭ evoluigas kaj oni konstatis ke la preparoj devas komenciĝi multe pli frue por ke ĉio estu en ordo. Dum la pasinta periodo neniu esperanto-aranĝoj okazis: SEF kunsidis en majo 2004, SEI renkontiĝis en alia loko kaj la rezulton oni tuj povas vidi en la financa raporto. Por eviti la malrofiton ni nepre bezonas:

1. trovi novajn fontojn de enspezoj (aktivecoj, kursoj kaj simile)
2. malaltigi la elspezojn (kiel?)
3. daŭre helpi per propra laboro dum diversaj aranĝoj
4. doni ekonomian helpo laŭpove ("eĉ guto mallgranda konstante frapante"...ktp)

Kiu volas doni monon al EG povas tion fari per poŝta ĝiro 444 02 45-1 - Esperantogården - anticipan dankon!



Fotis: Bengt-Olof Åradsson

Eldona en Gotenburgo

20 Aŭgusto s-ro Bengt Nordlöf alvenis kun granda ŝargauto kun la librostoko de la eldonejo Eldona Socio Esperanto de Stokholmo al la Gotenbarga klubejo. En la aŭto sidis ankaŭ Anita Dagmarsdotter, prezidantino de kaj la eldonejo kaj la klubo. Ili la tagon antaŭe haltis ĉe Esperanto-Domo en Lesjöfors por malŝarĝi iom de la stoko. La klubo ja ofertis siajn lokalojn por la librostoko kontraŭ lupago por kunpagi la ejon. La eldonejo estas devigata forlasi sian antaŭan lokalon pro tro granda altiĝo de la lupago.

Kelkaj el la klubo kaj el la estraro jam kolektiĝis por helpi enporti la libropakajojn en la klubejon. Ĉiuj kune oni estis 11 personoj, inkluzive du esperantoparolantaj junuloj el Hungario, Gergo kaj Robi.

Aŭtuna kunveno en Boden

*Takahashi Yoshiteru el Tokio kun kvar esperantistoj el Boden: Leif kaj Olof Nordenstorm, Lilian Kullenberg kaj Johan Krig Ölund.
Fotis: Kajsa Nordenstorm.*

En Boden dum multaj jaroj ne ekzistis Esperanto-klubo. En la komenco de Oktobro la urbon tamen vizitis Takahashi Yoshiteru el Tokio kune kun neesperantista amiko. La japanaj gastoj admiris la silenton kaj la eblecon vagadi en la naturo.

La Esperantistoj de Boden ĝojis ke

la eksterlanda vizito donis al ili kialon renkontiĝi.

Eble ni povos inspiri ankaŭ al esperantistoj en aliaj lokoj sen klubo tamen renkontiĝi.

La Hirundo por la lasta fojo

Dum sep jaroj la E-klubo en Väsby produktis kaj distribuis 57 numerojn de la revueto La Hirundo. Projekto kiu komenciĝis per ŝerco. Ni kredis ke ni eventuale donos unu jaron al tiu projekto.

La 11-an de julio 2005 mortis por ni grava redaktorino Anita Bergh kiu respondis pri la altnivela historia enhavo kiu donis al La Hirundo la specialan edukan koloron. Estis ŝoka kaj dolora bato por ni. Tial ni decidis ke ni ne plu produktos La Hirundon. Sed ni estas tre dankemaj por sep amuzaj jaroj.

Ni pensas pri alia projekto ekz. kiel allogi novajn homojn al esperantostudado - aŭ io simila.

Kaisa Hansen

La redaktoro de La Espero dankas por la bona laboro, kiun faris Esperanto en Väsby per "La Hirundo". La revueto estis treege grava dum periodoj kiam La Espero aperis neregule. Dankon!

På väg framåt

I skrivande stund har SEJU:s extra årsmöte ännu inte ägt rum. Detta blir därför en delvis hypotetisk text om det vi hoppas få gjort och beslutat där. Även om vi i styrelsen mest kommunicerar över nätet, är det när vi träffas i verkligheten som det verkligen händer något.

Lovisa Gustafsson och Carl Mäsak har tagit fram ett förslag till projektgång för projekt som drivs inom eller stöds av SEJU. Syftet är dels att skapa en tydligare struktur för vår verksamhet, och dels att uppmuntra våra medlemmar att komma på saker att göra i SEJU:s namn. Om du har någon idé, ta upp den på vår maillista eller kontakta styrelsen direkt.

Vi fortsätter även att svara på frågor om esperanto som kommer in via vår hemsida. De handlar oftast om skolarbeten, men ibland är det något som bara är intresserad av språket.

Mer om mötet kommer i nästa nummer av La Espero.

Magnus Henoch

TEJK-möte

I slutet av oktober håller TEJK (ett forum för europeiska esperantoungdomsorganisationer) ett möte i Turin, i Italien. SEJU representeras av Carl Mäsak.

ndlr

SEJU:s styrelse

Ordförande:

Magnus Henoch

Vice ordförande:

Carl Mäsak

Sekreterare:

Johan Krig Ölund

Övriga styrelseledamöter:

Sonja Petrović

Lovisa Gustafsson



Kolekto en Amsterdamo

La biblioteko de la Universitato de Amsterdamo posedas kolekton de libroj kaj gazetoj en kaj pri Esperanto, kiu nombras pli ol 3000 titolojn.

Parton de tiu stoko konsistigas la libraro de la landa asocio 'Esperanto Nederland', kiun la universitato mastrumas por ĝi. Post longa laboro, la tuta kolekto estas nun katalogita, kaj rete konsultebla. La adreso de la libere alirebla katalogo estas: <http://opc.uva.nl>. De la bonveniga paĝo vi povas elekti inter nederlandlingva kaj anglalingva daŭrigoj. Alklaku la supran ligon 'Catalogus van de Universiteit van Amsterdam' aŭ 'Catalogue of the Universiteit van Amsterdam' por atingi la elirpaĝon por viaj katalogaj esploroj.

Seminario en Burundio finiĝis

En mardo, la 6-a de septembro, finiĝis la Esperanto-seminario, aranĝita en Burundio helpe de subvencio de UEA. La seminario okazis en tri ejoj en la ĉefurbo Bujumbura, kaj krome en Rumonge, 72 kilometrojn de Bujumbura. La Cseh-instruisto Tereza Kapista pasigis pli ol monaton en Burundio. Krom multaj lokanoj la seminarion partoprenis 16 eksterlandaj afrikaj esperantistoj. Raportas la loka esperantisto, kunorganizinto de la seminario, Birindwa Mushosi. Laŭ li, ĉe la nacia universitato en Bujumbura estas pli ol 80 esperantistoj.

www.liberafolio.org

Ministro inaŭguris

Ĵaŭde la 25-an de Aŭgusto en Katmandu, la ĉefurbo de Nepalo, komenciĝis la 4-a azia kongreso de Esperanto. La kongreso devis laŭ la origina plano okazi komence de Marto, sed ĝi estis lastmomente prokrastita pro politika puĉo, farita de la nepala reĝo. En vendredo la kongreso estis inaŭgurita de la ministro pri turismo. En sabato okazis ampleksa kunsido pri la stato de la Esperantomovado en Azio.

www.liberafolio.org

Esperanto por malriĉaj gejunuloj

La profesoro de Geografio Neto Pimentel instuas Esperanto al ĉirkaŭ 40 gelernantoj de publika urba lernejo en malriĉa kvartalo de brazila urbo nome Terezina, ŝtato el Piaŭi. Ili estas ĉiuj dektria- aŭ dekkvara-jara adoleskuloj kaj ne havas kondiĉojn lerni aliajn lingvojn krom la portugalan. La instrulaboro de la profesoro estas tute senpaga kaj li celas nur doni lian kontribuon al la disvastigo de la internacia lingvo kaj plibonigi la kulturen vivon de tiuj homoj.

nun

Universitataj studoj en Pollando

Inter la 26-30a de Septembro okazis la unua sesio por la novaj gestudentoj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), en Poznan. 27 kandidatoj el 13 landoj aliĝis al la trijara ekstera studado, kiu postulas surlokan partoprenon nur dum unu intensa semajno ĉiusemestre, kaj tion sekvas hejma laboro kaj reta konsultado. La multnacia partoprenantaro ebligis interesajn interkulturajn komparojn.

La unua semestro konsistis el la kursoj pri komunikado (Ilona Koutny), enkonduko en esperantan kulturon (Zbigniew Galor), esperanta literaturo de la unua periodo (Lidia Ligeza kaj Tomasz Chmielik) kaj interlingvistiko 1 (Vera Barandovská-Frank kaj Detlev Blanke). La kurson pri kulturo kompletigis la prelegoj pri E-a teatro (Zofia Banet-Fornalowa), pri E-a muziko (Floréal Martorell) kaj pri e-aj filmoj (Roman Dobrzynski) okazintaj jam enkadre de la semajnfina kultura renkontiĝo Arkones.

Dum la sama semajno tri finstudintoj faris sukcesan finekzamenon defendante sian diplomlaboraĵon pri metodiko gvidatan de Katalin Kovats: Alain Delmotte (Belgio): Analizo de vortprovizo en kvar lernolibroj; Iwona Kocieba (polino el Belgio): Instruado de akuzativo; Mónika Molnár (hungarino el Svislando): Muziko en la instruado.

Arkones atendis la diligentajn ge-

studentojn per multe da elstara muziko (JoMo, Jacques Le Puil, Georgo Handzlik, Suzanna Kornicka, Jacques LePuil, Paulo Mojajev, Natalia Strijnjova, Yas Kawamura, Moliere Ngangu, Robert von dem Borne, la bandoj Dolchamar' kaj Krio de l' morto) kaj per aliaj kulturaj eventoj: de diverssternaj prelegoj tra oratora konkurso ĝis teceremonio.

d-rino Ilona Koutny, akademiano

Daŭrigo de paĝo 6:

Kaj ŝi malbrodis la tolaĵon.

Sekvanttage sinjoro Buslik forte ebruĝis kaj batis sinjorinon Buslik pro tio, ke ŝi elspezis du anserojn.

Mia avinjo eliĝis tra fenestro kaj ekkriis:

– He, stultulo! Se vi ne ĉesos, mi tuj brodos vin denove! Kaj tiam ankoraŭ du anseroj estos foruzataj!

Buslik malfermis sian buŝon por kontraŭdiri, sed kvankam nebuliĝis en la kapo li decidis silenti je propra bono.

Ni tagmanĝis. Panjo tamen farĉis la anseron ĥine, sed diris al la avo, ke ŝi tion faris laŭ malnovmoda priskribo. Li frandis kaj laŭdis.

– Vi ne kontraŭdiru, sed ukraina kuirarto estas la plej bona en la mondo. Nur pro la elpenso de kolbaso ni meritis eternan memoron. Sed kiu nun scias pri tio?.. Do, Jurĉjo, studu por esti saĝa kaj por memori la mondon, ke ĝi pro la kolbaso estas nia ŝuldanto.

Nu, mi finstudis kaj nun memorigas.

Tia estis mia avinjo, estu regno ĉiela por ŝi, ĉar la lastan, kion ŝi faris, ŝi brodis sin mem.

Jurij Vynnyĉuk

Elukrainigis: Viktor Pajuk

Klarigoj:

Haliĉano: ano de urbo Haliĉo
ĥunvejbino: ano de revolucia gvardio dum la kultura revolucio en Ĉinio
ĥino: malnova vorto por "ĉino"

La brodita mondo

De kiam mi memoras avinon, ŝi ĉiam brodadis. Dekomence mi ne tre atentis ŝiajn kreaĵojn, sed unufoje mi rimarkis, ke maljuna ĉerizujo, kreskinta apud mia fenestro, malaperis post kiam ĝi estis brodita de la avinjo. La ĉerizujo estis tute sekiĝinta kaj avo pli ol unu foje planis forsegi ĝin, sed nur planis. Kaj jen ĝi malestas.

Tiam mi penis rememori, ĉu ankoraŭ io malaperis, kaj subite ekmemoris, ke antaŭ nelonge foriĝis sovaĝinta hundo, kiu loĝis sur senuza tereno. Ĝi tiel terure hurlis nokte, ke la tuta ĉirkaŭaĵo malbenegis ĝin. Neniu lasis infanojn promeni, timigante, ke la hundo estas freneza. Oni, verdire, kelkfoje ĉasadis ĝin, sed aŭ ĝi estis tro lerta aŭ ege ruza, ĉar ĉiuj provoj estis vanaj. Kaj jen dum tuta semajno oni ne aŭdis ĝin. Komprenoble, ĝi povis mortaĉi aŭ foriri ien. Mi ekstrarigardis avinjan brodaĵon kaj sur iu kuseno ekvidis ĝin. Nun mi komprenis – ĉio, brodita de la avinjo, malaperas tuj. Nevane sur ŝiaj brodaĵoj estis nek homoj, nek la suno, nek aliaj bedaŭraĵoj. Mi ne scipovis min deteni por ne diri al la avo pri la eltrovo. Li nur levis la ŝultrojn:

- Nu, kion? Mi scias pri tio.
- Do, kial vi ne diris al mi?
- Mi ĉiam forgesis. Jen tio, jen alia...

Mi forgesis.

Poste li rigardis min, varmete ride-tante, kaj aldonis:

– Nu, bone. Mi rakontos al vi ĉion, kion mi scias. Do, tio okazis tuj post la milito... Tiam oni ekarestis multajn. Ĉiu nokte oni forveturigis homojn en Siberion. Malliberejoj estis plenŝopitaj. Ne trejnitan, ne ekipitan junularon oni ĵetis al militan fronton. Ĵetis rekten kontraŭ tankojn... Dio mia, kiom da junuloj pereis tiam!.. Haliĉanojn oni konsideris, vi scias kiel... Nur suspekteto – kaj vi trovas vin en prizonaĉo. Tiamaniere oni arestis ankaŭ min. Avinjo apenaŭ eltenis tion. Ŝi vagis, povrulinio, preter la malliberejo, penante ekvidi min. Iam ŝi sopirante sidadis vespere kaj ekbrodis. La malliberejo turniĝis en ŝiaj pensoj kaj junvirino komencis brodi ĝin. Ŝi brodis murojn, brikbarilon, brodis gardistojn kun hundoj. La laboron ŝi finis ĝuste noktomeze... Kaj ĉu povas malliberulo ekdormi? Ni kuŝis kaj pensis pri propraj aferoj, dormo ne aperis. Kaj subite ĉio, ŝajnis, estis ruinigita. Nek muroj, nek ŝtonbariloj – nur ni kuŝas meze de la korto. Ekkonsciinte tion, ni forfuĝis diversflanken... Nu, la prizono malaperis, sed niaj malliberi-

gantoj restis. Kaj ni devis kaŝi nin. Pli junaj foriris arbaren, aliaj – al foraj vilaĝoj kaj izolbienoj. Tiam ankaŭ ni translokiĝis en malproksiman vilaĝeton. Jen tiel... Verdire, ni kun la avinjo ne tuj ekkomprenis, ke okazis tio dank'al ŝia brodado. Ni pensis diversmaniere. Sed homoj parolis pri Di-Patrinio, ke nome ŝi ekkompatis kaj mirakle liberigis nin... Sed tempo pasis kaj mi rimarkis, ke malaperis nia kato. "Anjo, - mi diris, - kie estas nia Macko, oni ja ne vidas ĝin?" Subite ha! – sur la tablo estas metita brodaĵo kun nia Macko brodita. En la momento kvazaŭ io ekiĝis en mia kapo. "Anjo, - mi diris, - ĉu vi ne bonvolus malbrodi vian kreaĵon?" Kaj ŝi: "Kion vi elpensis? Mi tiom da tempo pasigis laborinte, kaj vi volas ĝin detruigi?" Nu, mi pensis, ne aŭskultu mi virinon! Poste mi prenis tondilon kaj forigis la brodaĵon. Apenaŭ mi elŝiris la lastan fadenon, kiam oni ekaŭdis – miaŭ, miaŭ! Jen nia Macko! Kaj estis ĝi tiel malsata, ke nur ekvidis lakton en telere, la kato tuj forlekis ĝin. "Jen, Anjo, - mi diris, - ĉio estas klara por mi: kion vi brodis, tio tuj malaperas. Sed ŝi ne kredas, nur primoketas min. Nu, bone... Poste mi petis ŝin brodi pajlan birdotimigilon starantan meze de legomĝardeno. Kaj kion vi pensas? Ŝi brodis la timigilon, rigardis tra fenestron – malaperis pajlaĵo, kvazaŭ bovino formanĝis ĝin! Nu, ĉu vi nun scias pri via kapablo? De tiam ŝi estis tre atenta por ne brodi tion, pri kio ni poste bedaŭru.

Poste evidentiĝis, ke ne nur mi kun avo, sed ankaŭ niaj najbaroj eksciis pri tiu... hm... talento de mia avinjo. Ĉiuj komencis rememori, ĉu ili ne malplezurigis sinjorinon Anjo, ĉar se ŝi ekkoleris kaj brodos iun! Kaj Voĉjo tuj ekmemoris, ke iam li forŝtelis nian kokon. Li kuraĝiĝis, venis al avinjo, konfesis je ĉio kaj kunportis anseron anstataŭ la koko. Li tiel pardonpetis, ke la avinjo malkulpigis lin. Verdire, venonttage la anseron forprenis sinjorino Buslik, ĉar la hejmbirdo ja estis la ŝia, sed tio ne malbonigis humoron de Voĉjo. Sed la plej interesa estas tio, ke la ansero denove revenis al ni. Kunportis ĝin sinjorino Buslik kaj diris:

– Sinjorino Anjo, prenu ĉi tiun anseron, sed mi petegas vin, ĉu vi ne bonvolus brodi mian edzon, ĉar tiu ebruilo fine mortigis min.

Oni devas mencii, ke mia avinjo malestimegis drinkulojn. Ne hezitante, ŝi tuj brodis sinjoron Buslik.

Kaj kion vi pensas? Unu semajno ankoraŭ ne pasis, kiam sinjorino Buslik alkuris kun alia ansero kaj peto revenigi al ŝi la edzon.

– Ne elspezu mian tempon! – nur respondis avinjo.

Sed mia patrino palpis la anseron kaj diris:

– Per kio mi povus farĉi ĝin? Ĉu per poligono aŭ per rizo?

– Mi ne forigos la brodaĵon, – grumbliis la avinjo.

– Per rizo kaj fungoj, – konsilis patro.

– Timu Dion, – ekploretis Buslikino. – Kiu mi nun estas? Nek vidvino, nek fraŭlino!

– Ŝajnas al mi, ke vi estas vidvino, – diris avo.

– Nu, kaj kiu nun buĉos ĝin? – demandis panjo, rigardante jen paĉjon, jen avon.

– La ansero piedbatu min, mi ne forigos la brodaĵon! – ĵuris avinjo.

– Mi ne dorlotu tie ĉi! – faris mienon paĉjo. – Jen mi prenos hakilon – hak-hak kaj ĝi estos senkapa.

En tiu momento avinjo malsulkigis la tolaĵon sur la tablo:

– Vi rigardu, via edzo estas kvazaŭ pentrita! Vidu, mi eĉ kurbigis liajn kruojn por ke li aspektu ebria. Kaj mi devas detruigi tion ĉi?

– Vi trovos hakilon en vestiblo, sub la ŝtuparo, – diris avo. – Mi volis akriĝi ĝin, sed forgesis.

– Mi tuj akriĝos, – paĉjo frotis la manojn kaj foriris en vestiblon.

– Se oni farĉus la anseron ĥine, ĝi estos bongustega, – daŭrigis panjo.

– Mi ne ŝatas ĥinojn, – kolere kontraŭdiris avo.

Kiam avo estis spionobservita kaj denove malliberigita, en prizono estis iu viro moknomita La Ĉino. Li alkitimiĝis alvoki meznokte politikajn malliberulojn kaj teni ilin en staranta pozo ĝis mateno. Pro tio avo, leginte ion novan pri hunvejbinoj, ŝatis aldoni:

– Se oni militos kontraŭ ĥinoj, mi estos la plej unua volontulo. Mi ja havas specialan intereson.

Tamen ĉinoj spertis la feliĉon, ĉar mia avo forpasis antaŭ la ŝtatlima sovet-ĉina konflikto.

– Mia edzo ne estis tro malbona, – ne ĉesis ploreti sinjorino Buslik. – Iam okazis, ke li iris porti akvon aŭ aĉeti lakton...

– Ve, sed, – avinjo svingis per mano, – estu, kiel devas esti!

La daŭrigon vi trovos sur paĝo 5.

Franko Luin



Subite kaj neatendite forpasis Franko Luin, 64-jara. Liaj plej proksimaj parencoj estas la edzino Ulla kaj la filo Janko. Franko Luin naskiĝis en en 1941 en Triesto, Italio, kie li apartenis al la slovenlingva malplimulto. Estis milito en Eŭropo kaj Triesto estis en unu el lokoj kiuj suferis pro la milito.

Kiel infano li spertis ke oni forkondukis lian patron al koncentrejo kaj ke tiu revenis post la militofino. La gefratoj de la patro helpis al la familio donante manĝaĵojn dum tiu periodo.

En la 1950-aj jaroj la familio loĝis en la slovena vilaĝo Repnic sur la alta montplataĵo ekster Triesto. La limoj ŝanĝiĝis post la milito, tiel ke la vilaĝo estis en Italio, je kelkaj kilometroj de la limo al Jugoslavio. La parenkaro de Franko loĝis ambaŭflanke de la limo. La malakordo inter la itala plimulto kaj la slovena malplimulto en Triesto ankoraŭ estis akra.

Franko lernis Esperanton kiel 15-jarulo, kaj partoprenis esperantajn junularajn aranĝojn en Jugoslavio. Li interesiĝis pri Esperanto kaj pro vera intereso pri lingvoj kaj pro la interna ideo de Esperanto. Per Esperanto li konatiĝis kun sia estonta edzino Ulla, kaj kun aliaj estontaj amikoj.

Li komencis studi interpretadon en la Triesta universitato, sed decidis forlasi Italion kaj translokiĝis al Svedio en 1961, kiam svedaj kompanioj serĉis laboristojn en suda Eŭropo. Laborinte en Lund kaj Malmö li ekstudis en la Grafika Instituto en Stokholmo. Studinte li eklaboris ĉe Ericsson, kiu tiam havis oficejon en Tyresö, kaj restis tie ĝis 1989.

Ekde 1989 li gvidis la entreprenon Omnibus Typografi kun grafikaj produktoj. Li komencis desegni komputilajn literojn, kaj fariĝis konata pro siaj tiparoj inter grafikistoj en la tuta mondo. Kiel evoluo de la tiparoj li ankaŭ komencis publikigi librojn

elektronike. Li aparte interesiĝis pri malnovaj libroj ne plu haveblaj, ekz. pri svedaj aŭtoroj el la 19a jarcento, sed ankaŭ pri libroj en Esperanto kaj en la slovena, interalie pri nova literaturo kaj pri kelkaj libroj kiuj ne publikigis papere, kaj li havis kontakton kun pluraj nuntempaj slovenaj aŭtoroj.

Franko interesiĝis pri revuoj. Jam en la juneco tiu intereso montriĝis tiel ke li uzis parton de la pormanĝa kaj poraŭtobusa monto por aĉeti revuojn, kiam li iris al la lernejo. En la 1990-aj jaroj, kiam interreto ekuziĝis, li aranĝis kolekton da 15000 ligoj al revuoj en la tuta monto, nomitan "Kiosko", kio fariĝis fundamento de biblioteka sistemo.

La intereso pri Esperanto de Franko estis fadeno tra la vivo. 1969 li kune kun la edzino Ulla organizis IJK-n en Tyresö. Li tradukis kantotekstojn en Esperanton, kaj mem verkis poezion en la lingvo. Li estis estrarano de Sveda Esperanto-Federacio, i.a. kiel prezidanto kaj redaktoro de La Espero. Kiam li ne redaktis La Esperon li helpis pri la grafika aspekto de la revuo. Dum periodo li estis komitatano de UEA. Lia grafika kaj komputila scioj faris lin pioniro de interretaj aferoj en Esperantio.

POEZIO

Posttagmezo

*Mi kuŝas en verda herbo
kaj pensas nenion*

*La vualnuboj postkuras sin
malaperas
por reaperi pli longe for
en sama daŭra ludo*

*La folioj super mi
kliniĝas unu al alia
fluŝante nekonatajn sekretojn
kiujn la vento kaŝaŭskultas
kaj diskonigas al la mondo*

*La sunradioj haltas sur la folioj
kaj lasas sin luli
lacaj de la longa vojaĝo*

Post la translokiĝo al Svedio en la 1960-aj jaroj Franko ekkomprenis ke li devis ekzerci sian slovenan gepatran lingvon por ne perdi la kontakton kun sia deveno. Li eklegadis slovenan gazeton, unue abonante, poste interrete, kaj li partoprenis someran kurson por elmigrintaj slovenoj. La parenca tradicio en lia hejmgregiono estas forta, kaj la parencoj daŭre havis kontakton kun li. En Svedio Franko havis kontakton kun slovenoj estante estrarano de Sved-Slovena Amikeca Asocio. La belajn slovenajn kantojn, kiujn li lernis en sia juneco, li kantis partoprenante en la slovena kantogrupo.

La filo Janko kiu naskiĝis en 1979 ricevis slovenan nomon sed lernis Esperanton kaj la svedan. Por Franko estis grava afero esti bona patro, kaj tial multaj interesoj devis ripozi kiam la filo estis malgranda. Ankaŭ Franko mem estis dekomence dulingva kun slovena gepatra lingvo kaj itala, kiel la lingvo de la ĉirkaŭaĵo kaj de la aŭtoritatoj. Li lernis la svedan ĝisperfekte. Emocie li ĉiam estis sloveno, kvankam li neniam estis slovena civitano.

Amiko forlasis nin. Li mankas al ni.
Leif Nordenstorm

Spuroj de miaj paŝoj

*La ondoj ankoraŭ ne vekigiĝis
de la nokta dormo
la sablo
seka ne ankoraŭ varma
ŝutiĝas sub la piedoj
la spuroj post ili
estas profundaj kaj longe videblaj
malantaŭ mi*

*Longa estas la vojo
al la leviĝanta suno
la piedoj laciĝas
la koro deziras reen*


*La sunleviĝo vekas la ondojn
la vento salute rapidas al ĝi*

*Kiam la piedoj turniĝas
for estas jam
la spuroj de miaj paŝoj
la vojo reen nekonata
nevidebla la celo*

*La koro ektemas en silenta timo
kaj ekbatas pli forte*

Franko Luin

El la pagana kredo al la kristanismo



Leif Nordenstorm, Arne la ĉefido, rakonto el la vikinga epoko, Kava - Pech, 2005. 112 p.

Konforme al reala historia fakto kiu datiĝas el la jaro 829, laŭ kiu du misiistoj Ansgar kaj Vitmar vojaĝis al tiam pagana Svedio por disvastigi la kristanisman, Leif Nordenstorm (1960), plektas interesan rakonton pri vikinga tribo kiu havis la historian honoron esti vizitita far tiuj du misiistoj. La aŭtoro ekkonigas nin kun preskaŭ idilia vivo de la tribo, precize dirite kun la tribestra familio kiu trankvile kaj libere vivas, laboras kaj timas nur de la atakoj de la mar-piratoj. La filo Arne, saĝa kaj klarvida knabo estas la ĉefheroo de la rakonto, iuspeca "hingŝo*" ĉirkaŭ kiu turniĝas la rakonto. Tiel ni ekkonas multon el la svedaj tradicio kaj historio precipe de la tempo de vikingoj, iliajn ĉiutagan vivon, ritojn, kutimojn, timojn...

La aŭtoro klopodis montri la momenton de la granda civiliza turno: vikinga kontakto kun nova religio, la kristanismo, kiu baldaŭ fariĝos la dominanta tutmonda religio kiu fundamente kaj diversmaniere ŝanĝos la mondon. Li tion faras pere de sia literaturheroo Arne, la ĉefido. La knabo dum interparolo kun du misiistoj kristanaj, ekkomprenis kaj iom post iom akceptis la moralajn valorojn de la

nova religio. Li konsciis ankaŭ ke la sklaveco kaj socia malegaleco ne estas la naturaj kategorioj, far dioj ordigitaj kaj pro tio neŝanĝeblaj. Ŝanĝiĝas ankaŭ lia vidpunkto konforme al la sociordo de la tribo, same lia rilato al la sklavoj. Li eksentas ke ankaŭ ili estas homoj, ne nur puraj iloj kiuj parolas. Nordenstorm montras (pale kaj nesufiĉe) al ni la moralan transformon de la vikinga knabo. La knabo certe estas simbolo de la tutvikinga transformo el la paganaj kredoj al la kristanismo.

Por la aŭtoro la tradicio estas sendube grava, tial la rakonto estas kurta, efekta, la stilo konciza kaj fokusa al deziro prezenti la ĉefajn trajtojn de la vikinga komunumo sed bedaŭrinde ne ankaŭ la psikologiajn. Malhavo de pli profundaj psikologiaj rilatoj inter la literaturherooj estas la ĉefa manko de la novelo. Plue, Nordenstorm estetigas la primitivan vivon de la vikingoj, en iliaj kondutoj sentighas surpriza spirito de la tute civilizitaj homoj, sed ne la atenditaj senbrido kaj nekontrolitaj instinktoj kiuj estas normalaj karakterizoj de ĉiuj barbaraj triboj. Sed li donacis tiel belegajn bildojn el la antikva vivo kun pitoreskaj priskriboj de la ritoj kaj moroj ke leganto havas senton ke li mem troviĝas inter la vikingoj kaj partoprenas tiajn festenojn.

Bedaŭrinde la aŭtoro ne disvolvas la ideon pri la vikinga kristanigo literature pli profunde kaj pli kuraĝe. Pri ĝi li rakontas iom preterpase, kvaŭzaŭ temas, ne pri la dramatika kaj grandturna evento kiu plenigis la naŭan kaj la dekan jarcentojn, sed pri ne tre grava epizodo. Komprenoble se li faris tion, ni certe havos antaŭ niaj okuloj dikan romanon, ĉar ĉi tia literatura ekspliko nepre bezonus ampleksan strukturon, stilajn variaciojn, certan metaprozan nivelon, kaj pli analitikan pripenson pri la kaŭzeco de la fenomenoj literature pritrakitaj. Tiel oni pli klare formus nelaŭvortan teksto-sencon kaj leganto estus direktata legi la kovritan sencon. Tiamaniere la vera, reala situacio kiu tiel bele kaj klare prezentis al ni Nordenstorm, iĝus simbolika, la tem-dominanto estus ne nur la pura rakonto el la vikinga vivo sed ilia (la vikinga) ververa spirita lumigo pere de novciviliza fundamentstarigo.

Tamen tiun ĉi mallongan romanon oni nepre devus tralegi, inter alie, ankaŭ pro senti la delikatan lirismojn kaj ĝui la simplan kaj fluan lingvon.

Zlatoje Martinov

* Hingŝo: pordhoko (laŭ Plena Vortaro)

Historio de la movado

HISTORIO

DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korjenkov

Serio Scio, Volumo 5

Aleksandr Korjenkov. Historio de Esperanto. 128 p. Sezonoj. Kaliningrado 2005.

Jen libro pri la historio de la Esperanto-movado, do ne pri la lingvo, nek pri ĝia literaturo.

"Historio de Esperanto" ne estas la unua libro kun tiu titolo. En la sesdekaj jaroj aperis tri dikaj volumoj kun la sama titolo. En la sepdekaj jaroj aperis "Esperanto en perspektivo", dika ĝenerala priskribo de la historio kaj nuno de la movado kaj ĝia literaturo.

Tiu ĉi libro malsamas kompare al la menciitaj unue ĉar ĝi estas moderna; ĝi priskribas ankaŭ la periodon post la falo de la Berlina muro. Due, ĉar ĝi ne estas dikega, tiel ke ankaŭ homoj kiuj ne havas multege da tempo povas tralegi ĝin. Ĝi estas vere leginda libro, ĉar ĝi priskribas la ĝeneralajn trajtojn de la movada historio, sed ellasas tro abundajn faktojn, kiuj lacigus la plej multajn legantojn.

Mi menciuj la nomojn de la ĉapitroj: La iniciatoro de Esperanto; La unuaj jaroj; La franca periodo; Du gravaj jaroj: 1905-1906; Ido-skismo; Serĉante organizan solvon; Antaŭ internaciaj institucioj; La neŭtrala movado inter la du mondmilitoj; For la neŭtralismon! [Pri la laborista E-movado]; Post la dua mondmilito; Post la falo de la Berlina Muro.

Mia sola plendo pri la libro estas ke mankas ĉapitro pri la komputila kaj interreta periode de Esperanto, sed eble tio troviĝos en la dua eldono.

Leif Nordenstorm